Österreichische
Nationalbibliothek

Kolekto por Planlingvoj
kaj Esperantomuzeo
Palais Mollard
Herrengasse 9
A-1010 WIEN
tel.: (+43 1) 53 410 / 731 (730)
fakso: +43 1) 53 410 / 733

www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index/htm
herbert.mayer@onb.ac.at

Kolokvo pri Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj 19-an kaj 20-an oktobro 2007 en la Aŭstria Nacia Biblioteko

Vieno, septembro 2007

Estimata,

nia planlingva spirita heredaĵo estas konservata en bibliotekoj kaj arkivoj. Ĉi-rilate bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj, tro ofte nekonsciataj. Pro tio la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, aranĝos internacian kolokvon en Esperanto je la temo

“Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj”.

Financas la kolokvon la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj subvencie subtenas ĝin Institucio Hodler (UEA). Ĝi okazos sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la Esperantomuzeo, Mollardgasse 9, A-1010 Wien.

La celo de la kolokvo estas prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diverstipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj.

La reciproka konatiĝo de la koncernaj respondeculoj, la komuna pridiskuto de la nuntempa rolo de niaj bibliotekoj kaj arkivoj, helpu al ni trovi konvenajn vojojn kaj metodojn por starigi kunlaboron kaj interhelpon.

Programskemo:
19-a de oktobro: Malfermo (9h00), faka programo, komuna vespero
20-a de oktobro: Daŭrigo de la faka programo ĝis vespero

Kotizo: 45 €, reduktite 30 €

La teknikajn aferojn de la restado (tranoktoj ktp.) solvos ĉiu partoprenonto mem.

Programo

19-a de oktobro

9h00 Herbert MAYER: Tradicia biblioteko – kaj defioj de novaj teknologioj:
La Kolekto por Planlingvoj de la Austria Nacia Biblioteko
10h00 Detlev BLANKE: Planlingvaj arkivoj – problemoj kaj praktikaj spertoj
11h00 Utho MAIER / Karl Heinz SCHAEFFER: La Germana Esperanto-Biblioteko Aalen
hieraŭ, hodiaŭ kaj kio morgaŭ?

13h00 Christian CIMPA: La daten-bankoj de La Kolekto Por Planlingvoj /
Skanadaj kaj digitalizaj projektoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko
14h00 Marek BLAHUS: Propono pri starigo de interreta superkatalogo kaj
cifereca arĥivo de Esperanto-literaturo
15h00 Árpád MÁTHÈ: Periodaĵoj en bibliotekoj kaj libraroj
16h00 Reinhard HAUPENTHAL: La plan-lingvo Volapük en arkivoj kaj bibliotekoj

Komuna vespero en Viena „Heuriger“

20-a de Oktobro

9h00 Miroslav MALOVEC: Esperanto-bibliotekoj en Ĉeĥio kaj disponigo de
libroj per elektroniko
10h00 Andrea MONTAGNER: Bibliotekoj kaj Esperanto: Ĉu alia aparta mondo?
11h00 Gvidado tra la Muzeo kaj la Kolekto

13h00 Toon WITKAM: Provlegado post Skanado – Homo kaj teĥnologio
14h00 Ljubomir TRIFONĈOVSKI: La bibliotekoj - ĉu nur deponejoj?
15h00 laborkunsido pri kunlaboro inter planlingvaj bibliotekoj

daŭro de unu prelego: maksimume 40 minutoj